

La lingva situacio en la hodiaŭa mondo, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 547, 1974.04.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian prelegaron pri la lingva situacio en la mondo per rigardo al la estonteco.

A.- Ni ne forgesu, ke ne nur la lingva situacio en la mondo rapide ŝanĝiĝas. Ankaŭ sociologie, ekonomie, demografie la homaro disvolviĝas. Tiu evoluo povos havi neatenditajn lingvajn konsekvencojn. Lingve la popoloj, kiuj rifuzas kontroli sian demografian kreskon, estas favorataj kompare kun la gentoj, kiuj organizis naskokontrolon. Landoj ĝis nun subevoluintaj kaj lingve sen graveco subite fariĝas ege potencaj pro nura posedo de energifontoj. Krizo en lingve unuecigita naciaro povas malfortigi la pozicion de la koncerna lingvo.

Cl.- Jen 5 evolu-eblecoj de la mondlingva situacio :

- a) Kresko de la nombro de la lingvoj oficiale uzataj en la mondorganizaĵoj.
- b) Stabiliĝo de la nuna situacio.
- c) Konservante la saman nombron de oficialaj kaj laboraj lingvoj la mondorganizaĵoj tamen reelektas la privilegiajn lingvojn laŭ la evoluo de la lingva situacio en la mondo.
- d) Malkresko de la nombro de la lingvoj oficiale uzataj en la internaciaj organizaĵoj.
- e) Elektro de monda interlingvo.

A.- Punkto a) : Kresko de la nombro de la lingvoj oficiale uzataj en la mondorganizaĵoj. Ĝis nun la evoluo disvolviĝis en tiun direkton. Antaŭ 1919 la franca profitis pri diplomatia hegemonio. Ligon de Nacioj karakterizis la angla-franca bilingvismo. De 1945 ĝis 1971 UN fakte praktikis kvarlingvismon anglan, francan, hispanan kaj rusan. Nun ili ekpaŝas al seslingvismo angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa. Multaj opinias, ke aliaj lingvoj estos oficialigitaj. Tiu kresko de la oficialaj lingvoj de UN tamen kondukos al financaj kaj teknikaj problemoj nesolveblaj. Pro tio estos limo al tiu kresko, almenaŭ koncerne la nombron de la labor-lingvoj. La babeliĝo de UN povos eĉ paradokse favori la geografie plej disvastiĝintajn etnajn lingvojn kaj la plej konatan planlingvon. Tiuj lingvoj estas la angla, la araba, la hispana kaj esperanto. La ĉina kaj la rusa lingvoj estos daŭre praktikataj internaciskale nur se la koncernaj nacioj kapablos altiri al si la simpatieco de la orientaziaj kaj slavaj popoloj. Povas esti, ke el nigra Afriko foje disradios bantua lingvo kiel ekzemple la svahila. Fine tiu evoluo kondukos al la formiĝo de vastaj lingvaj imperioj. Inter ili la rilatoj efektivigos helpe de la samtempa interpretado kaj de la tradukarto. Aliĝi al unu el tiuj lingvaj imperioj estos absolute necesa, se oni volos eviti kulturan kaj teknikan subevoluiĝon. La etlingvaj nacioj havos la tendecon favori la uzon de planlingvo kiel esperanto.

Cl.- Punkto b) : Stabiliĝo de la nuna situacio. Por eviti rediskuton de la lingvaj problemoj en la internaciaj organizaĵoj la registaraj delegacioj decidis resti je la aktuala statuto. Aŭtomate la afrikaj kaj aziaj gentoj sentos sin malfavorataj rilate al la eŭropaj kaj amerikaj. Pro tio tiu situacio necese kondukos al konfliktoj.

A.- Punkto c) : Konservante la saman nombron de oficialaj kaj laboraj lingvoj la mondorganizaĵoj tamen reelektas la privilegiajn lingvojn laŭ la evoluo de la lingva situacio en la mondo. Pro statutaj, teknikaj kaj financaj kaŭzoj UN kaj la ceteraj mondorganizaĵoj povos decidi ne ŝanĝi la nombron de la oficialaj kaj laboraj lingvoj. Sed por eviti lingvajn konfliktojn, de tempo al tempo okazos veraj lingvaj elektoj, kiuj favoros la geografie plej uzatajn. Tiu situacio estas malfavora al lingvoj kiel la franca kaj la rusa, kies parolantarojn

superas tiuj de aliaj pli gravaj lingvoj. Oni povas antaŭvidi, ke la franca kaj rusa registaroj kontraŭstaros tiun evoluon. Tiu evoluo povos esti favora al planlingvo kiel esperanto, kiam ĝia disvastiĝo estos sufiĉe vasta.

Cl.- Punkto d) : Malkresko de la nombro de la lingvoj oficiale uzataj en la internaciaj organizaĵoj. Por eviti la elektojn, kiujn ni menciis en la lasta punkto, la mondorganizaĵoj povos decidi uzi nur la vere internaciajn lingvojn, tio estas la lingvoj parolataj de multaj nacioj. Nur tri etnaj lingvoj povos esti konsiderataj : la angla, la araba kaj la hispan-portugala. Tiam la homaro konos trilingvismon. Se planlingvo kiel esperanto sufiĉe vaste disvastiĝos, tiam ĝi povos esti oficialigita apud la tri aliaj etnaj lingvoj.

A.- Punkto e) : Elektro de monda interlingvo. Multaj homoj favoras tiun evoluon : inter ili ni registras la adeptojn de la nura uzo de la angla lingvo kaj la praktikantojn de planlingvo kiel esperanto aŭ interlingua. Pro financaj kaj praktikaj konsideroj UN kaj aliaj mondorganizaĵoj povos decidi rezigni je la samtempa interpretado kaj tradukado de dokumentoj. Oni povas antaŭvidi, ke lingva komisiono devos ekzameni la situacion kaj la reciprokajn kvalitojn kaj mankojn de la lingvo-kandidatoj. Neniu povas diveni la konkludon de tiu analizo. Ĝi povos esti favora al lingvo kiel la angla pro ties graveco kultura kaj scienca kaj pro la ekonomia dinamismo de ĝiaj parolantoj. Tiu analizo povos esti favora al esperanto. Sed ĝi ankaŭ povos proponi la ellaboron de pli taŭga kaj pli universala planlingvo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon en konkluda analizo ni vidos kiajn danĝerojn devos alfronti esperanto sur la vojo al ebla oficialiĝo. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!